

TERMINOLOGIA KONKURSO 2014 POR STUDENTOJ

Ĉu vi estas studento?

Ĉu vi membras ĉe TEJO aŭ/kaj UEA?

Ĉu vi emus lerni pri terminologio?




Aliĝu al la Terminologia konkurso kaj venontsomere vojaĝu al Vieno!

<http://www.esperanto.net/tec>

Limdato: 31-an de marto 2014

Konkurso organizita de
La Terminologia komisiono de Universala Esperanto-Asocio
Oficialaj partneroj



TERMINOLOGIA KONKURSO 2014 POR STUDENTOJ

Dum la **somero 2014**, t.e. **de la 14-a ĝis la 18-a de julio**, okazos en **Vieno** (Aŭstrio) unusemajna neesperantista **trejnado pri terminologio**. La celgrupanoj de la trejnado estas iuj ajn, kiuj interesiĝas pri **faka komunikado**. La trejnado eblas ankaŭ por homoj tute sen antaŭkonoj pri terminologio, kiuj tamen interesiĝas pri terminologia administrado, ĉu el la vidpunkto de lingvistoj (ekz. tradukistoj), ĉu el tiu de aliaj fakuloj (ekz. inĝenieroj aŭ komputilistoj kiuj okupiĝas pri teknologioj por komunikado, dokumentado, klasifikado de scioj...).

Legu pli da detaloj pri la aranĝo en la retejo de la organizantoj: http://www.termnet.org/english/events/tss_2014/index.php

Legu la raporton de esperanta studento, kiu partoprenis la trejnadon antaŭ 2 jaroj: http://esperanto.net/tec/itss_2012.pdf

Kio estas la ĉefa premio de la konkurso?

Per la konkurso vi povas gajni subvencion por la unusemajna terminologia kurso pri terminologio organizita de TermNet en Vieno.

La subvencio valoras ĉirkaŭ 1000 eŭrojn kaj inkluzivas

- ĉambron en junulargastejo en Vieno dum la kurso
- unusemajnan bileton por amasveturiloj en Vieno
- plenan studentan aliĝ-kotizon al la **terminologia kurso** (valoro: 390 eŭroj)
- tuton aŭ parton de viaj vojaĝ-kostoj (viaj vojaĝ-kostoj estos repagitaj al vi ĝis maksimume 500 eŭroj)

Kio estas la kondiĉoj por partopreni la konkurson?

- paroli Esperanton
- esti TEJO-/UEA-membro
- esti studento
- labornivele scipovi la anglan (ĉar la terminologia kurso estos en la angla)
- preti zorgi kune kun UEA pri la necesaj paperaĵoj por vojaĝi al Aŭstrio
- aliĝi ĝis maksimume la 31-a de marto 2014

Kiel oni aliĝas al la konkurso?

Por aliĝi al la konkurso, estas tri simplaj paŝoj:

- 1) Preparu **viv-resumon** pri vi en Esperanto (maksimume du paĝoj de tipo A4) kaj **motiv-leteron** en Esperanto, kiu klarigas kial vi volas lerni pri terminologio (prefere unupaĝa).
- 2) **Retmesaĝe sendu** vian viv-resumon kaj motiv-leteron al la retadreso tec@co.uea.org.
- 3) **Plenumu la retan formularon** kun viaj personaj informoj kaj sendu ĝin.

Kio okazas, se vi ne gajnas la konkurson?

La **unua premio**, t.e. la vojaĝo al Vieno kaj la subvenciita partopreno en la trejnado, estos donita al du gajnontoj. Tamen, eĉ se vi ne gajnas la vojaĝon al Vieno, ne zorgu, estas aliaj premioj por konsoli vin! Ili jenas:

Dua premio (dufoje): La libro de Wera Blanke "Pri terminologia laboro en Esperanto", kiu aperis pasintjare ĉe la eldonejo Mondial kaj estas la plej ampleksa kaj enhavo-riĉa libro pri terminologio en Esperanto (valoro: ĉirkaŭ 20 eŭroj)

Tria premio (sepfoje): La konciza enkonduka libro de Heidi Suonuuti "Terminologia gvidilo", por lerni la bazojn pri terminologio (valoro: ĉirkaŭ 10 eŭroj)

Ĉu vi havas demandojn? Skribu al tec@co.uea.org